Johann Wolfgang von Goethe,

Grenzen der Menschheit

tradukita de Alexander Taussig

Se la praega
Sankta la patro
Trankvilamane
El nuboj rulsonaj
Sendas fulmbenojn
Super la teron,
Mi de l'vestaĵo
Lia la randon
Kisas timeme,
Lin konfidante.

Ĉar kun la dioj
Sin ne komparu
Homa estaĵ'!
Tuŝas la stelojn
Tiam nenie
Plandoj malcertaj
Povas sin kroĉi
Kaj kun li ludas
Nuboj kaj ventoj.

Se li kun ostoj
Firmaj, fortikaj
Staras sur tero
Daŭre fondita,
Li ne kapablas
Eĉ sin kompari
Nek kun la kverko
Nek kun la vito.

Kio distingas
Diojn de l'homoj?
Ke antaŭ tiuj
Migras ondaro,
Eterna torent':
Nin ondo levas,
Ĝi nin englutas,
Ni alfundiĝas.

. . .

Rondo malvasta
Vivon limigas
Nian kaj multaj
Generacioj
Daŭre viciĝas
Al ĉeno senfina
De la ekzisto.

Traduko de la Germana poemo "Grenzen der Menschheit" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* ALEXANDER TAUSSIG *(∗1865-08-24).*

Arg-493-962 (2009-08-17 16:05:33)

Mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis en tiu versio - kompare al al traduko de A. Taussig, la trian kaj la lastan linion de la unua strofo.